

La Verda Stelo



**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

somero 2013



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72

retadreso:

johan.swenker@xs4all.nl

sekretariejo

s-ino N.R. Kiel-Klunder
G. Sterringastraat 60
9728 VV Groningen
tel. +31505251436

retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

kasisto

s-ro R.Hofman
Irenestraat 90
9744 CK Groningen
tel +310642247155
richardhofman@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72

retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

J.B. Swenker, N.R. Kiel-Klunder
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com



Enhavo

- 3 klubkunvenoj
- 4 naskiĝtagoj
- 5 pri la nordo
- 11 renkontiĝo de korespondamikoj
- 14 peto
- 15 nekrologoj

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2013

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op ING banknr. 3822472 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Groningen	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van **ESPERANTO NEDERLAND**.

Vandaar dat wij hier ook het rekeningnummer ervan vermelden:
78 68 44 167 (TRIODOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland,
Monnickendam

Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X)	€ 30,00
Gezinslid	€ 10,00

Klubkunvenoj

somerkunveno:

24-08-13 15.00 "High Tea", Feithhuys
 Martinikerkhof 10 Groningen
Bonvolu aliĝi antaŭ la 5-a de aŭgusto!
 (050 5251436/ nrkielklunder@hotmail.com)

12	septembro	2013	pri la ferioj
26	septembro	2013	gramatiko
10	oktobro	2013	malferma vespero
24	oktobro	2013	ludvespero
7	novembro	2013	Filmo <i>De kameleon</i>
21	novembro	2013	pri nia naskiĝurbo
19	decembro	2013	festvespero ekde la 19.00
9	januaro	2014	vivanta gazeto
23	januaro	2014	bildenigmoj
6	februaro	2014	lingva rubriko
20	februaro	2014	jarkunveno
6	marto	2014	tradukado
20	marto	2014	ankoraŭ nekonata
3	aprilo	2014	ovoj: kvizo, receptoj kaj pli
1	majo	2014	krucvortenigmoj
15	majo	2014	kune manĝi

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
 ŝanĝojn vi trovos en nia
 retejo sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>

Naskiĝtagoj

10 aŭgusto	Nelly Kiel
16 aŭgusto	Koos Scharroo
30 aŭgusto	Johan Swenker
3 septembro	Wiebren Akkerman
5 septembro	Berendina Brink
7 septembro	Marita Kruijswijk
17 septembro	Henny Hogen-Cornelissen
24 septembro	Els van der Heij-Alblas
2 oktobro	Fien Koopmans-Hollenga
15 oktobro	s-ino Behr-Kunst
29 oktobro	Bets Dodebier
1 decembro	Richard Hofman
30 decembro	Rients Hettinga



Sudoku

En la antaŭa *La Verda Stelo* vi trovis du sudoku-enigmajn.

La solvoj estas jenaj:

7	1	6	3	5	8	4	2	9
8	4	9	2	6	7	3	1	5
3	5	2	4	1	9	6	8	7
5	6	7	9	4	1	8	3	2
4	8	1	5	3	2	7	9	6
9	2	3	8	7	6	5	4	1
2	9	4	6	8	5	1	7	3
1	3	5	7	2	4	9	6	8
6	7	8	1	9	3	2	5	4

Solvo de simpla enigmo

4	6	9	8	1	5	2	3	7
5	1	7	9	2	3	4	6	8
8	3	2	4	6	7	5	1	9
3	7	6	2	9	4	1	8	5
9	5	8	1	3	6	7	2	4
1	2	4	5	7	8	6	9	3
2	9	5	3	4	1	8	7	6
6	4	1	7	8	9	3	5	2
7	8	3	6	5	2	9	4	1

Solvo de dua enigmo

Pri la nordo

3 januaro 2013

Vivanta gazeto

La unua klubkunveno de la nova jara okazis la 3-an de januaro. Estas tago antaŭ la naskiĝdatreveno de Wil. Ŝi regalis nin per pufkuketoj kaj rulvolvitaj novjarkukoj. La novjarkukoj simbolas la novan jaron. Antaŭ Novjaro ili estas tiaj, ke oni ankoraŭ ne povas vidi la novan jaron. Poste ili estas malvolvitaj. Sed rulvolvitaj ili povas enteni batitan kremon.



En 1979 *Tibor Sekelj* verkis la infanlibron *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo* pri aventuroj inter la indianaj triboj en Brazilo. Pasintan jaron Johan Derks tradukis ĝin en la nederlandan. Pere de la reta listo de Wil li klopodas vendi ilin al (komencantaj) esperantistoj.

Alia Esperanto-novaĵo aperis en *Dagblad van het Noorden*. Ĝi temas pri *Alfred Nobel* okaze de la prezentado de la Nobel-premioj. Ŝajne Nobel estis ankaŭ verkisto. Lia teatraĵo *Nemesis* aperis en tempolinio pri Nobel ekde lia naskiĝo en 1833: ĝi aperis en 2003 en dulingva eldono: en la sveda kaj en Esperanto.

La temo de la vespero estis *Vivanta*

gazeto. Fakte tio signifas, ke ĉiu povas babili pri kio ajn. Plej grave estas, ke ĉiu povas ekzerci sin pri parolado en Esperanto. Ni do aŭdis diversajn aferojn. Interalie: En 32 elementaj lernejoj en Nederlando la infanoj lernas ekde la unua grupo la anglan dum unu horo semajne. Ĉu tio funkcias kiam la instruistoj mem la anglan ne regas?

Bankrotis la fama ĝeto de *Scheveningen*, laŭ peto de la posedanto. La pasintan jaron la butikoj kaj restoracio viglis ankoraŭ.

Protokolis Johan

17 januaro 2013

La 17-an de januaro ni kunvenis sesope: Johan, Nelly, Wil, Ineke, Harm kaj Björn.


Tiujn du lastajn ni bonvenigis entuziasme post longa periodo de malsano.

Komence de la kunveno Johan voĉlegis protokolon kiun li verkis. Post tio ni diskutis pri la diferenco inter *Hindujo* kaj *Barato*.

Aliaj temoj estis la UK en Islando kun postkongreso en Gronlando, koncerto de Kajto en *Sint-Annen* kaj post la jarkunveno en Utreĥto, kaj kiel varbi amikojn por Esperanto Nederland? Ĉu eble per korespondkartformata aliĝilo? Iu sciigis, ke la *Universiteitskrant* en Groningen ne plu ekzistas papere sed nur interrete.

Harm renkontis en Anglio je Novjaro *Tim Freke*, verkiston de la libreto *Lucid Living*. La libro temas pri sonĝado dum kiu oni rimarkas, ke oni sonĝas kaj pro tio kapablas ŝanĝi la sonĝon en alia direkto. La vivo estas kiel sonĝo!

Harm estis petata traduki la libreton en Esperanton kun la promeso, ke la libro tiam estos eldonata. Harm kaj Björn kunportis la parton jam de ili tradukitan kaj petis nian helpon. Fakte ni povis helpi



nur gramatike, ĉar traduki la iomete filozofian tekston el la angla estas malfacile. Eble Rob Moerbeek, Gerrit Berveling aŭ aliaj kapablas tion fari. Ni admiris la jam tradukitan parton.

Estis agrabla, lerniga vespero.

Wil van Ganswijk-Vlasblom.

31 januaro 2013

Ĉeftemo de la kunveno: *Krucvortenigmoj*.

Wil laŭtlegas *La Unuan Komunikon*, kiu troviĝas en UEA-vikio. Johan Derks tradukis ĝin en la nederlandan kaj aldonis kelkajn rimarkigojn.

Ineke dankas pro la ricevita gratulkarto okaze de sia naskiĝtago. Ŝi proponas, ke la gratulservo aŭfranku la kartojn per

Esperanto-poŝtmarkoj anstataŭ ordinaraj poŝtmarkoj. Ni opinias la ideon bona, kaj Gonda mendos la E-poŝtmarkojn.

Ŝi proponas ankaŭ, ke la klubo presigu gratulkartojn laŭ propra ideo, ekzemple *Hema*-fotokartojn kun la teksto *La Esperanto-klubo gratulas*. Ni klopodos fari kelkajn ekzemplojn.

Ineke sciigas, ke la estraro de Esperanto Nederland havas du novajn (pliajn) membrojn: *Pieter Engwirda* kaj *Juri Smolders*.

Ŝi kunportis libron kun la titolo *Inleiding in de Interlinguïstiek*, kiun verkis Wim Jansen kiu okupas ekde 2002 la specialan katedron pri *Interlingvistiko kaj Esperanto* ĉe la universitato de Amsterdam.

Prof. dr-o. inĝ. Wim Jansen emeritiĝis kaj la universitato baldaŭ prezentos novan docenton.

Li estas invitita al la jarkunveno de Esperanto Nederland kaj parolos pri la libro.

Nelly sciigas, ke ŝi ne povos ĉeesti la jarkunvenon de Esperanto Noord-Nederland (la 14-an de marto).

Ŝi prizorgis la ĉi-vesperan ĉeftemon *Krucvortenigmoj*. Ŝi disdonis kelkajn foliojn kun enigmoj, kaj la ĉeestantoj diligente klopodis solvi la enigmojn. Precipe la unua krucvortenigmo montriĝis ne facile solvebla, ĉar ĝi estis plena de kriptajtoj.

La dua tasko estis vortserĉado. Tiun enigmon ni sukcesis solvi pli facile.

Protokolis Luit Staghouwer

28 februaro 2013

Frambokuko

Ĉu vi esperas, ke vi legos pri bakado de kuko? Ne, Johan parolis ne pri receptoj, fruktoj aŭ tortoj, sed pri malgranda komputilo! Li montris al ni kelkajn eblojn.




Ĉi tiu komputilo estas farita por infanoj. Oni rimarkis, ke infanoj ne plu uzas la komputilon por programi, sed ofte nur por ludoj.

Kiamaniere veki la intereson? La respondo estas: krei simplan malmultekostan komputilon, kiu havas multe da konektiloj kaj ebloj. Tiamaniere la frambokuko provokas infanojn eksperimenti kun la komputilo.

La nomo estas *Raspberry Pi*: frambokuko. *Raspberry* simple estas frukto, simile kiel *Apple* kaj *Blackberry*. Eble vi konas tiujn. *Pi* estas mallongigo de *Python*, kiu estas la ĉefa komputila lingvo por *Raspberry Pi*, komparebla kun *Basic* por iamaj hejmkomputiloj, sed pli moderna ol *Fortran* kaj *Cobol*, kaj sufiĉe simpla por instrui al infanoj. La frambokuko estas ne nur por infanoj, sed uzas ĝin ankaŭ multaj plenkreskuloj!

Ĉu vi volas havi superkomputilon? Konektu pli da frambokukoj!

Johan tre entuziasme parolis pri la aparato kaj montris multon. Ne estas simple priskribi tiun vesperon. Ĉu vi volas



scii pli?

Kontaktu johan.swenker@xs4all.nl

lom pri la tekniko:

- Eterreto: 10/100 Mbps
- USB 2.0: 2 konektiloj por klavaro kaj muso
- uzu nabon kun propra kurento por durdisko kaj WiFi-bastoneto
- Aŭdvidaĵo: HDMI *
- Kurento: mikra USB
- Memoro: SD Karto
- RPi estas uzata kiel Xbox
- La grafika procesoro kapablas produkti HD-televidon (1920x1080)
- GPIO+ kontektilo
- ekzemple lampoj, ŝaltiloj, i2c-aparato, termometro
- RS232 : iam uzata por muso kaj modemo tamen simpla metodo por konekti al aliaj aparatoj
- I2C : LCD-ekrano
- Kameraa konektilo
- malgranda: 85mm x 56 mm (simile granda ol kreditkarto) kaj malmultekosta: \$35

* High Definition Multimedia Interface: tre distingiva plurmedia interfacio; ĝi donas bonkvalitajn bildojn

+General Purpose IO: Ĝeneral-cela eneliro

Nelly

14 marto 2013

La 14-an de marto okazis nia jarkunveno. Kiel kutime ĝi ne estas nura jurkunveno, sed ankaŭ plezura klubkunveno.

Ero de jarkunveno estas ĉiufoje elekto de novaj estraranoj. Pasintan jaron Ineke evite diris "eble post 13 jaroj". Kaj tio aperis en la protokolo. Ŝi ne neis tion, tiel ke ŝi eĉ ripete diris "eble post 12 jaroj".

Ni ja havas novan kasiston: *Richard Hofman* transprenis tiun taskon de Luit. Richard estas kursano de Wil. Li iras al ŝi ĉiusemajne. Kune ili ofte tradukis la alternsemajnajn ripetaĵojn de Rob Moerbeek. Sed lastatempe ili preferas studi per la ekzamenajn ekzercojn.

Alia grava parto de la jarkunveno estas elekti novan kaskontrol-komisionon. Ineke kaj Wil pretas kontroli en 2014 la kason pri la jaro 2013.

La jarkunveno jam finiĝis je la naŭa. Poste ni parolis pri multaj aliaj aferoj.

Telefone ni aŭdis, ke *Bram van der Heij* estis en malsanulejo kaj ekde la komenco de decembro en flegejo. Li rompis al si la kruron. Wil vizitis lin dufoje. Bram estis operaciita jam dufoje, kaj Wil perceptis, ke la anestezo malbone efikis sur lia menso. Aliloke vi povas legi, ke li mortis la 22-an de aprilo.

Ineke kunportis leteron de sia amikino *Yoandra* el Kubo. Tiu vizitis nian klubon en la jaro antaŭ la kuba UK. Ni do iomete konas ŝin, kial Ineke voĉlegis parton de letero. Yoandra estas abonanto de *La Verda Stelo*. Salutojn, Yoandra!

Ĉiun jaron Wil ricevas el Rumanio bondeziron por la printempo. Vi povas legi en *La Verda Stelo* de la pasinta jaro pri la pupetoj, kiujn ŝi tial ricevas.

La sesa mezorienta Esperanto-kunveno okazos ĉi-jare en Armenio. Ineke iros al la kunveno denove. Sed ekzistas problemo: ĉu la turkaj esperantistoj povas, rajtas kaj volas veni? Parto de la programo estas vizito al muzeo pri la armena genocido. La turka registaro neas la genocidon. Ineke iros ĉiuokaze.

Ĉu ankaŭ vi ricevis inviton de Kajto ĉeesti ilian programon pri *Pieter Poot*? Luit iris al la prezentado en *Appingedam*. Fakte ne estis Kajto, sed *Nanne kaj Ankie* kun tria persono. Ni konas Kajto-n pro la kantoj en Esperanto. Pieter Poot tamen estas en la nederlanda lingvo. Luit diris, ke li ĝuis la prezentadon, kaj ke la tria persono estas bona kompletigo.

Finfine Luit havis novaĵon pri Joseph: li nun havas postenon en *Bydgoszcz*. Luit kaj Joseph neniam renkontiĝis. Sed legu aliloke: intertempe Joseph vizitis Nederlandon kaj gastis ĉe Luit kaj Monika.

Protokolis Johan

11 aprilo 2013

Ĉeftemo: Ineke prelegos pri Armenio. Wiebren renkontis sinjorinon el *Hemelen*, kiu interesiĝas pri Esperanto. Ĉar ŝi ne havas komputilon, Wil sendos al ŝi la unuan (surpaperan) lecionon.

Wil ricevis mesaĝon de sia iama (nun 14-jara) kursano Frank.

Ŝi parolis kun kelkaj parencoj de Bram van der Heij, kiu ekde la tago de *Sankta Nikolao* estas en malsanulejo.

Richard sciigas, ke la banko *ING* jam adaptis la adreson rilate la konton de la klubo (pro la ŝanĝo de kasisto).

Johan sciigas pri la invito por kluboj partopreni renkontiĝon, kiu celas ĉefe

pliĝulojn (personojn kiuj havas minimume 55 jarojn). Wil kaj Ineke partoprenos tiun renkontiĝon en la *Wessel Gansfort College*.

Luit sciigas pri la prospero de sia konga korespondamiko Joseph en Pollando.

Ineke partoprenis la 6-an mezorientan Esperanto-kunvenon en *Jerevan*, la ĉefurbo de Armenio. Estis ankaŭ partoprenantoj el Turkio, Britio, Kartvelio, Francio, Usono kaj Israelo. La diferencoj inter Jerevan (proksimume unu miliono da enloĝantoj) kaj la kamparaj regionoj estas grandaj. Sed ankaŭ en la urbo mem la diferencoj estas grandaj.

Oni i.a. faris promenon tra la urbo kaj vizitis la bluan moskeon (konstruita en 1765), kiu estas la nura moskeo en Jerevan. Sed abundas ortodoksaj preĝejoj.



Oni vizitis ankaŭ la memorlokon pri la genocido en 1905. Turkio neas, ke la genocido okazis, kaj precipe pro tiu neado la limo inter Armenio kaj Turkio ankoraŭ estas fermita. La vetero en Jerevan estis agrabla (20 ĝis 24 gradoj).

De Jerevan oni povas bone vidi la monton *Ararat* (pli ol 5100 metrojn alta), la nacia simbolo de Armenio, kvankam (nun) situanta en Turkio.


Kiel memorigaĵon Ineke kunportis i.a. *ABC-libron*. La literoj tute ne similas tiujn de la latina alfabeto.

Ineke montris ankaŭ kelkajn monbiletojn kaj monerojn. La armena monunuco estas *dram*. Unu eŭro egalas proksimume 500 dramojn.

La venonta mezorienta kunveno okazos



ekzercbrodaĵo kun la armenia alfabeto



memorloko pri la genocido verŝajne en *Tbiliso*, Kartvelio.

Protokolis Luit Staghouver

25 aprilo 2013

Hazarde ni aŭskultis pri kunveno por organizoj rilate al 55-plusuloj. La unua kunveno celas la organizojn mem, por ke ili ekkonu unu la alian. Nia klubo ne celas maljunulojn. Kiam mi membriĝis, mi estis ankoraŭ tridekjarulo. Sed tamen ni nun havas sufiĉe da 55-plusuloj por iri al tia kunveno. Ineke kaj Wil iris kaj havis kontaktojn kun aliaj organizoj. En oktobro okazos nova kunveno, sed tiam ankaŭ la publiko estos invitita.

Libera Folio estas sendependa reta gazeto por la Esperanto-movado. Antaŭ sia foriro al la 6-a mezorienta kunveno, Ineke legis la artikolon: *Kverelo pri genocido minacas Mezoriantan kunvenon*. La kunveno tamen okazis laŭplane. Ĉu *Libera Folio* estas nur klaĝgazeto? Juĝu mem kaj vizitu <http://www.liberafolio.org/>.

Antaŭ kelkaj tagoj mortis Bram van der Heij. Wil ĉeestos la funebran ceremonion en la kremaciejo. Tiam ŝi diros kelkajn vortojn nome de la klubo. Dum la klubkunveno ŝi jam voĉlegis tion antaŭ ni. Baldaŭ estos la kvina de majo, kaj ni denove prezentos nin per budo dum la liberiĝofestivalo. Por paroligi la vizitantojn ni decidis havi demandaron. Apude vi povas trovi ĝin.

La programo de la 25-a estis la ekzercoj el Fenikso. Ili estis interesaj, do paroligis nin. Por ni estas iomete bedaŭre, ke la respondoj tuj sekvas la demandojn. Estis do malfacile respondi la demandojn sen ŝtelrigardi la respondojn.

Protokolis Johan

Wie ontwierp het Esperanto?

- L. de Beaufront
- L.L. Zamenhof
- J.M. Schleyer
- L. Couturat

In welk land is het hoofdkantoor van de Esperanto-wereldvereniging gevestigd?

- Polen
- Zwitserland
- U.S.A.
- Nederland

In hoeveel landen wordt Esperanto gesproken?

- Circa 5
- Circa 50
- Vrijwel overal

Hoeveel kunsttalen zijn er?

- Circa 10
- Circa 100
- Circa 1000
- Circa 10000

Waar wordt in 2013 het Esperanto-wereldcongres gehouden?

- Lille
- Buenos Aires
- Reykjavik
- Hanoi

Wat is Pasporta Servo?

- Een visumdienst
- Een boekje met gastadressen
- De Esperantovergaling van 'Servisch paspoort'

Renkontiĝo de korespondamikoj

Vendredon, la 31-an de majo mi trajne veturis al Groningen por renkonti mian korespondamikon Joseph el Kongo. Antaŭ proksimume dek jaroj ni komencis la korespondadon. Li tiam loĝis kiel rifuĝinto en Sud-Afriko. Joseph veturis al Groningen per aŭtobuso. Kompreneble ne el Kongo, sed el *Gdansk* en Pollando, de kie li per trajno veturis el *Bydgoszcz* (kie li loĝas kaj laboras) al Gdansk.

Entute li estis pli ol unu tagnokton survoje. Ni renkontiĝis neniam antaŭe, sed ni tuj rekonis unu la alian, kaj la renkontiĝo estis tre agrabla.

Mi decidis, ke ni montros al Joseph la ĉirkaŭan pejzaĝon de Bedum kaj kelkajn lokojn, kiujn ni regule vizitas.



Sabaton ni kune trajnveturis al Groningen, por ke mi povu montri al li la centron de la urbo. En la restoracio de la hotelo, kie antaŭ kelkaj tagoj tranoktis nia gereĝa paro, ni trinkis tason da kafo, kaj sur la foiro ni manĝis "belgan" terpomfritaĵon. Dum iom da tempo ni aŭskultis la konatan stratmuzikiston *Moti*.

La *Groningen-an Muzeon* ni ne forgesis, kaj mi montris al Joseph la statuon de *La Ĉevalo de Onĉjo Luks'*. Mi montris al Joseph ankaŭ parton de la kanalingo kun la multaj malgrandaj ŝipoj kaj boatoj. La loĝado sur la plimulto de tiuj "flosantaj loĝejoj" sendube estas malpli komforta ol en ordinara domo. Mi opinias, ke meza ordinara domo aspektas iom pli orde ol multaj el tiuj flosantaj "palacoj".

Mi intencis viziti ankaŭ la Martini-preĝejon, sed bedaŭrinde ne eblis. Pro tio ni iris al la Sint-Jozef-preĝejo kun ĝia sesflanka turo. Ĉar ĉiam videblas du aŭ tri horloĝojn samtempe, oni donis al la turo la kromnomon *ebrula turo*. La preĝejo estas bele ornamita kaj indas viziton.

Lauwersoog estis la destino de nia dimanĉa ekskurso, sed en Mensingeweer ni haltis por gustumi tason da teo aŭ kafo en la muelejo *Hollands Welvaart*. Ternivele en la malnova muelejo (konstruita en 1855) estas kaf- kaj tetrinkejo.



Mia edzino Monica kaj mi regule vizitas la muelejon. Ankaŭ ĉi-foje oni afable bonvenigis nin. La volontula servistino aŭskultis kun interesiĝo nian paroladon en tiu por ŝi fremda lingvo. Ni klarigis al ŝi, ke tiu lingvo estas Esperanto kaj ke en tiu lingvo ekzistas i.a. multaj libroj, ekzemple bela libreto pri la muelejoj en

Nederlando. Entuziasme ŝi petis de mi iam montri tiun libreton. Intertempe mi povis donaci al ŝi ekzempleron de tiu libreto kaj ankaŭ ekzempleron de *Esperanto-Sleutel*.

Ni vizitis ankaŭ la supran parton de la muelejo, kaj la muelisto eksplikis al ni la funkciadon de la muelejo. En la gastlibro de la muelejo Joseph skribis kelkajn liniojn en Esperanto kaj en tiu de la kaf-kaj tetrinkejo en la svahila.

En Lauwersoog ni rigardis la multajn fiŝistajn ŝipojn kaj kompreneble gustumis fiŝaĵojn. Bedaŭrinde la planita veturado trans la Lauwersmeer per la nova pramo ne povis okazi, ĉar la pramservo ne jam funkciis. Estis agrabla vetero, pro kio ni decidis fari promenon tra la pli-malpli arbara regiono.



Post kiam Joseph forlasis Kongon, li ne plu biciklis, sed bicikladon oni neniam mallernas. Krome la vojoj en la ĉirkaŭaĵo de Bedum ne estas trafikplenaj kaj pro tio

mi proponis al Joseph kune fari biciklan ekskurson. Li volonte akceptis la inviton, kaj lundon ni biciklis unue al *Onderdendam*, daŭrigis la bicikladon al la vilaĝeto *Fraamklap* kaj poste paŭzis kaj trinkis kafon en la bieno *Fraam*. En tiu bieno laboras diversaj zorgobezonantuloj.

Afabla staĝantino prizorgis gvidadon tra la bieno. La "klientoj" havas diversajn taskojn, i.a. fari birdonutrejojn, birdodometojn kaj kandelajn. Oni prizorgas ankaŭ kelkajn kuniklojn, ŝafojn kaj azenojn. Kiel memorigaĵon Joseph ricevis kandelon.



Reen al Bedum ni biciklis tra inter kampoj kun bovinoj kaj kelkaj kampoj kiuj flavis pro kolzo. Mi montru al Joseph nepre ankaŭ la deklivan turon de Bedum.



La Walfridus-preĝejo estas unu el la plej malnovaj preĝejoj en la provinco Groningen. La plej malnova parto de la preĝejo datiĝas de la 11-a jarcento. Oni diras, ke la turo estas pli dekliva ol tiu de Pisa. Ĉiuokaze ĝi estas la plej dekliva de nia lando.

Posttagmeze ni aŭte veturis al alia tre konata vidindaĵo en nia regiono: *Noordpolderzijl*. La haveno de Noordpolderzijl estas la plej malgranda eksterdiga marhaveno de Nederlando. Dum ventego la haveno i.a. estas por malgrandaj jaĥtoj rifuĝejo. Nur dum alta tajdo jaĥtoj kaj malgrandaj fiŝistaj ŝipoj povas en- kaj elhaveniĝi. Starante sur la digo, oni povas ĝui la panoramon. Sur la eksterdigaj grundoj ofte abundas anseroj, iom pli malproksime estas la Vadomaro kaj trans la Vadomaro videblas la insuloj *Schiermonnikoog*, *Rottumeroog*, *Rottumerplaat* kaj *Borkum*. Kvankam Noordpolderzijl ne "zumas pro vigleco", oni preskaŭ neniam estas la nura vizitanto. Jam dum multaj jaroj en la iama kluzista domo estas la nostalgia kafejo 't *Zielhoes*. En la "bruna" kafejo ni trinkis tason da kafo.



Monica kaj mi marde ĉiam partoprenas ekskurson tra la ĝardenoj de *De Wiershoeck* kaj la apuda *Schoolwerktuin* en la kvartalo *Beijum* (Groningen). Ĉar

Joseph pozitive respondis la demandon ĉu eventuale plaĉos al li partopreni la ekskurson, ni trio pe biciklis tien. Feliĉe la vetero daŭre estis agrabla, kaj la ekskurso estis interesa por Joseph pro pluraj kialoj. Plaĉis al li rigardi per speciala binokulo florojn kaj insektojn. Unu el la partoprenantoj estas belgino, kiu jam tridek jarojn preskaŭ ne plu parolis la francan lingvon. Kun ĝojo ŝi kaptis la okazon paroli kun Joseph en la franca. Kun aliaj personoj li konversaciis en la angla kaj kompreneble ni kune parolis Esperanton.

Post la kuna kaftrinkado Joseph kaj mi daŭrigis la bicikladon. Ni iris al alia ĝardeno de mi ŝatata: la tombejo *Selwerderhof*. Mi ne iras tien por viziti tombon, ĉar tie ne estas parencoj miaj. La arboj, arbustoj kaj floroj sur la Selwerderhof ofte estas belaj kaj allogas interesajn insektojn. Mi ŝatas klopodi foti ilin. La iama aŭlo nun estas kaf- kaj tetrinkejo, tre agrabla loko kie oni povas trinki bongustan kafon kaj teon en kvieta etoso.

Per mallonga promeno mi montris al Joseph la buntecon de la tombejo. Multaj novaj tomboj estas ornamitaj per ĉiuspecaj bildoj k.t.p., kaj ili ne plu estas en rektaj linioj kiel antaŭe.

Reen al Bedum ni biciklis tra la (pli-malpli) rezervejo *Koningslaagte*. En la pejzaĝo oni ankoraŭ povas vidi kie iam fluis la rivero *Hunze*. Meze en tiu regiono estas la malnova poldera muelejo *Koningslaagte*, kiu estas konstruita en 1878. Kvankam moderna drenmaŝino nun forigas la troan akvon de la poldero, la poldera muelejo tamen en kazo de troĝeno ankoraŭ povas dreni parton de la poldero.



Vespere okazis tre agrabla kunveno en la hejmo de Ineke Emmelkamp. Pluraj membroj de nia klubo (sed ne nur) renkontiĝis kun Joseph. Kelkaj el ili lin jam renkontis dum la Universala Kongreso en Bjalistoko. Boudewijn (nia nova membro el Zwolle) kunportis gitaron kaj ni aŭskultis kun plezuro la muzikon kaj kantadon. Ankaŭ Joseph iom gitarludis kaj kantis (en la svahila lingvo).

La gastigantino regalis nin per supo, trinkaĵoj kaj kelkaj manĝaĵoj. Ĉar ankaŭ la gastoj kunportis hejmfaritajn manĝaĵojn kaj aliajn bongustaĵojn, neniu reiris hejmen malsata.

Luit Staghouver

Peto

Vi jam ofte vidis petojn en nia informilo pri mono. Tiam la peto venas de la kasisto. Nun havas peton al vi la redakcio: **Ĉu vi volas verki artikoletojn por *La Verda Stelo*?**

Granda parto de ĝi temas pri la klubkunvenojn. Tiel la membroj, kiuj ne povas veni, tamen povas ĝui la liberan etoson de la kunvenoj. Inverse, la klubanoj ŝatas aŭdi pri la membroj. Precipe pri tiuj, kiuj ne povas veni.

Ni do invitas vin verki artikoleon, aŭ eĉ plurajn. Se necese la redakcio tradukas, sed kun iom da helpo de Google <http://translate.google.nl/#nl/eo/vertaal> vi mem povas verki originale en Esperanto.

La redakcio



Forpaso

La 22-an de aprilo 2013 forpasis nia membro **Bram van der Heij** en la aĝo de 83 jaroj. Dum multaj jaroj, ekde 1965, li estis membro de nia klubo, aktiva kiel kasisto, prizorganto de nia klublibraro, kaj dum kelkaj jaroj li aperigis nian klubgazeton.

Jam kiel junulo li lernis Esperanton. Kuzo atentigis lin pri tiu eblo. Lia instruisto estis s-ro *Varkevisser* en *Scheveningen*. Al Groningen li venis kiel instruisto en lernejo por surdaj infanoj. Els, lia edzino, lernis Esperanton post lia pensiĝo, por ke ili kune povu partopreni Esperanto-okazaĵojn. Ili ĉeestis la Universalajn Kongresojn en *Luzern*, *Stokholmo* kaj *Antverpeno*.



Bram estis facile parolanta persono, gaja kaj afabla. En la botanika ĝardeno en *Haren*, kie li estis volontulo, li organizis por nia grupo gvidadon tra la ĉina ĝardeno, pri kiu li povis rakonti multon. La lastajn jarojn li ne plu vizitis niajn kunvenojn pro malfacila irado kaj perdo de energio. En marto ni aŭdis, ke li estis falinta en decembro. Li rompis al si la kruron, kaj en malsanulejo oni dufoje operaciis lin pro tio. Mi vizitis lin nome de la klubo kaj poste ankoraŭ kelkfoje en la

flegejo.

Neatendite li forpasis tagon post mia lasta vizito. Dum la funebra ceremonio mi parolis nome de ni ĉiuj. Ni rememoros Bram kun simpatio. Ke li ripozu en paco.
Wil van Ganswijk-Vlasblom.

La 21-an de majo mortis nia membro **Berend Opheikens** en la aĝo de 84 jaroj. Pro anemio li estis kelkajn tagojn en malsanulejo, sed neatendite li tie forpasis, ok monatojn post la forpaso de sia edzino.

Li interesiĝis pri lingvoj kaj sekve de tio li



lernis Esperanton, parte memstare, parte kiel kursano de mi.

Li trovis baldaŭ korespondamikojn: unu en Kubo kaj alian en Ukrainio. Li intencis viziti niajn klubkunvenojn kaj volonte partoprenus Esperanto-kongreson, sed tio restis planoj.

Pli bone ol paroli Esperanton li povis senerare traduki kaj skribi ĝin, kaj li estis entuziasma pri la lingvo.

Mi ĉeestis la adiaŭan diservon. Ni esperu, ke li ripozos en paco.

Wil van Ganswijk-Vlasblom.

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - taal zonder grenzen